

Numero: 288.
Majo: 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Gepatra lingvo

Antaŭ kelkaj tagoj mi legis en fejsbuko, hungara patrino babiladas skribe kun sia filineto en angla lingvo.

Eble nun kelkaj demandas, kial ĝi estas novaĵo? Certe multaj gejunuloj iris por labori al diversaj Eŭropaj landoj. Humore oni diras, Londono estas la dua plej granda hungara urbo. Hejmerestintaj familianoj kontaktas kun ili rete aŭ telefone.

Tiuj gejunuloj, kiuj laboras eksterlande vole nevole ellernas la lokan lingvon.

Oni povus diri, ke ĉi tio estas bona, laŭdinda, se oni ne povis ellerni iujn fremdajn lingvojn en la baza kaj mezlernejo. Dum laboro la hungaraj gejunuloj lernas lingvojn.

Tion mi ne komprenas, kial ili komunikas unu kun la alia en fremda lingvo. Kial ili forĵetas la gepatran lingvon.

Se oni laboras eksterlande, tiam jam oni forgesas la lingvon, kiun ŝi/li lernis de sia patrino.

Kio fariĝos el nia belega hungara lingvo, se ĉi tiu fenomeno pluas, la naciaj lingvoj estos en danĝero.

Mi kuraĝigas la homojn laborantaj eksterlande, ili ne hontu la gepatran lingvon. Ankaŭ eksterlande estu fiera pri via lingvo.

Kompreneble, mi ne sugestas al vi, ke ne lernu lingvojn. Fakte estus bone, se la homaro uzus neŭtralan lingvon, per kiu la diverslingvaj homoj povus komuniki. Ne nur la gastlaboristoj devus lerni fremdajn lingvojn, sed estus necese ellerni ĉi tiun komunikilon por ĉiu. Tiel estus juste.

Mi rekomendas al tiuj homoj, kiuj deziras labori en iu fremda lando, ili lernu Esperanton!

En la estonto la zamenhofa lingvo devus plenumi pli grandan rolon en la gastlaboro. Ĝi estas rapide ellernebla, eĉ ĝi estus uzebla en ĉiu lando.

La gastlaboristoj ofte iras al alia lando, kie oni parolas alian lingvon. El ĝi sekvas, la gastlaboristo denove devas lerni lingvon.

Ĉi tiun diablan rondon per Esperanto oni povus elimini kaj povus ŝpari multe da tempo kaj mono.

Do, indas pripensi la aferon, kaj popularigi la Internacian Lingvon.

-Redaktanto-



Beboj

En la infanvartejo estis tri diversnaciaj beboj. La gepatroj venis el diversaj landoj. Ili ĉiuj laboris en granda fabriko.

Por ke ili povu labori, la bebojn ili devis lasi en la infanvartejo de la fabriko.

La etuloj de mateno ĝis malfruvespero restis tie.

La gepatroj ĉiutage renkontiĝis, kiam ili portis la bebojn.

Ili antaŭ nelonge alvenis al la fremda lando forlasante patrujon. Por ili granda ŝarĝo estis la lingvolernado. Ili nepre devis ellerni la lokan lingvon. Sen la lingvoscio ili ne povintus labori. Krome ili bezonis ĝin ankaŭ en la ĉiutaga afero.

La beboj ankoraŭ ne povis paroli. Ili nur kuŝis en la mola liteto kaj ili babiladis en internacia infanolingvo.

Strange ili ankoraŭ komprenis unu la alian, kvankam la gepatroj venis el diversaj landoj kaj ili parolis tute aliajn lingvojn.

Tre interese, bebo estas pli saĝa, ol plenkreska homo. Ili ne havas lingvajn malfacilaĵojn. Ili bonege komprenas unu la alian.

Ĉi tiun praan scion fuŝas la plenkreskuloj.

Kiom bone estus, se ĉi tiu scio restus kaj sur la tergloblo ĉiu homo parolus saman lingvon. Ni povus ŝpari multan monon kaj energion, kion forrabas de ni la lingvolernado.

La beboj vigle babiladas en la internacia infanolingvo, ĝis la gepatroj instruos al ili sian lingvon.

Pentekoste venis la sankta spirito, kaj la apostoloj komencis paroli en diversaj lingvoj. Mi petas Sinjoron, refaru unu lingvon, ĉar ĉi tio estis pli bona stato.

Vidu la bebojn en la infanovartejo, ili komprenas unu la alian, ne gravas al kiu nacio ili apartenas.

-Ŝaŝa-



Pozio

Post kelkaj semajnoj estos somere. La homoj libertempas. Multaj ekiras eksterlanden kaj ili vizitas diversajn landojn.

Ili konatiĝas kun la lokaj vidindaĵoj, muzeoj, ekskursejoj, plaĝoj, kuirarto de tiu lando.

Ĉu nin interesa la loka literaturo? Ĉu ni klopodas ekkoni la tieajn poetojn, verkistojn? Ĉu ni emas legi ion el ilia plumo.

Mi scias, ne. Dum nia ferio ĉio interesas nin. Nur lastfoje kaj nur kelkaj deziras ekkoni ankaŭ ilian literaturon.

Se ni vojaĝos eksterlanden, nin interesu ankaŭ la tieaj verkaĵoj kaj poemoj! Mi garantias kun ĝi nia eksterlanda vojaĝo estos pli neforgesebla.

jen kokcinelo ... hajko

floras "sakura"
jen paŝetanta korvo
sola ek-strabas

nu verdan teon ...
gvatas tra fenestro ho!
petaloj ŝvebas

obskura luno ...
obsedate de versi
modeste dormas

jen kokcinelo
imitas etan fragon
inter folioj



nigraj flugiloj ... hajko

freŝe nebulo...
staras sola senvorte
en legomejo

plaĝa hibisko ...
skuiĝaj fiŝbarkoj en
eta haveno

nigraj flugiloj
flirte papilumas ...
transceda tempo

duon-bakita
somero pendas nokte ...
silentaj nuboj




la ruĝa dorso ... hajko

rusta monero
apud vojo, kreskantaj
artemizioj

pale plenluno ...
svage olda-gazetoj
ĉe ĉambr-angulo

la ruĝa dorso ...
kokcinelo flug-portas
la universon



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XXIII-a

–Mi ne scias – respondis Johano. – Ni estu singardemaj. Ni kaŝiĝu!

En la proksimo estis kolono. Ili kaŝiĝis malantaŭ ĝi.

Longe ili atendis. Nenio okazis. La paŝoj mallaŭtiĝis. Eble ili nur halucinis. Vere paŝoj ne estis aŭdeblaj.

Jam Johano deziris forlasi la kaŝejon, kiam ili denove ekaŭdis la proksimiĝantajn paŝojn.

Certe la posedanto de la paŝoj estis singardema, aŭ li ĉasas serĉante novalvenintojn.

Kion fari? Ili ne havas armilon. Eble tiu alia ulo estas bone armita. Se ili malkaŝas sin, tiam ili ne havos ŝancon por vivi.

Ili devas elpensi ion kaj konvinkiĝi pri la misterulo.



En ilia koro regis timo. Precipe la onklino timegis. Antaŭe ŝi ĉiam sciis, kion fari. Sur Luno ŝi estis memfidema. Ŝi nun tute ruiniĝis. Izabela similas al infano.

Johano ne ĉagrenus tiel, se li estus sola. Sed la maljunulino estis por li problemo. Li devis atenti ankaŭ al ŝi.

Johano ĵetis rigardeton al la onklino kaj li vidis, ke ŝi ploras.

–Ne ploru, onklino! – li flustris al ŝi. – Oni ne scias, ke ni estas ĉi tie. Ni atendos silente ĝis la paŝoj alvenos al ni. Mi trovis metalotubon sur tero. Ĝi estos nia armilo. Mi petegas, ne timu, kara!

La onklino ĉesis plori, sed en ŝiaj okuloj vidiĝis timego.

Johano forte tenis la metalotubon pretigante sin por la ĝismorta batalo. Se almenaŭ la onklino estus pli bona animstato, tiam duope ili povus venki facile la fremdulon. Verŝajne ŝi ne estos kapabla helpi al li. Li sola devos lukti kontraŭ la malamiko.

Denove longaj minutoj pasis. Ofte ĉesis la paŝoj. Ili ne sciis, kio okazas. Johano singardeme kaŝrigardis de malantaŭ la kolono. Bonŝance ĝi estis granda kaj ĝi perfekte kaŝis ilin.

Post longa atendado la ombro de la malamiko ekaperis en la malproksimo. Ĝi estis timiga. Verdire la ombro diris nenion, ĉar ĝi povas esti la silueto de maldikulo. Nur la lumo pligrandigis lian korpon.

La tempo rampis, kiel heliko. Johanon ĝi tre nervozigis. Prefere li jam estus vidinta mem la atakanton.

Kiun armilon li havas? – li pensis. – Estus bone scii.



La paŝoj mallaŭtiĝis. Eble li haltis kaj ankaŭ li atendas esperante, ke Johano montrus sin kaj tiam li povos likvidi lin.

Por ĉiam oni ne povas atendi. Iu devas agi. Kiu havos pli fortan nervon?

De paŝo al paŝo proksimiĝis la malamiko. La onklino Izabela tremis. Videble ŝi timis de la morto. Ankaŭ Johano ne fartis bone. Vere li jam transvivis similan situacion en la kelo.

Ankaŭ tiam li ne sciis, kio okazos. Fine li saviĝis kaj la malbona sonĝo forvaporiĝis.

Estus tre bone, se ankaŭ nun ĉi tiu okazus.

Neatendite en la tunelo fariĝis malhelo. Ili vidis nenion. La ombro de la malamiko malaperis.

Ĉi tio surprizis Johanon. Li vidis nenion.

–Kio okazis? – demandis tre mallaŭte la onklino. – Kial estas malhele?

–Mi ne scias. Mi vidas nenion.

–Terure! – ĝemis la oldulino.

En la sekva momento virina voĉo estis aŭdebla:

–Kiu vi estas?

Johano kaj Izabela ne respondis. Ili timis, ke ĝi estas kamptilo. Ili ne volis malkaŝi, kie ili kaŝis sin.

–Halo! Mi estas Elinjo. Ĉu vi estas Johano?

-daŭrigota-



Por infanoj

Kompatinda cikonio



Karaj infanoj, certe nun vi atendas mian fabelon pri reĝido aŭ reĝidino. Ĝis nun ĉi tie vi povis legi belajn, lernindajn fabelojn.

Nun mi rakontas al vi teruran, veran historion pri kompatinda cikonio. Ĉi tio ne estas fabelo. Bedaŭrinde ĝi okazis en la korto de iu hungara bazlernejo.

Iam estis cikonio, kiu nestis sur la kamentubo de la najbara loĝdomo. Ĉi tie ĝi vivas kun sia paro jam de jaroj. Aŭtune, kiam proksimiĝas la malvarma vetero ili forflugas al Afriko, sed, kiel printempigas ili ĉiufoje revenis al sia hejmo, kie la cikonino elkovas el ovoĵo tri – kvar idojn. Kun sia cikonio patro instruas flugi la etulojn.

La cikonioj rapide al kutimiĝis al la infanoj. Ilin ne ĝenis la laŭta bruo de la geknaboj. Tial ofte ili promenadis en la ĝardeno serĉante nutraĵon: muson, ranon, insektojn al la cikonidoj.

Estis dimanĉe, kaj la korto de la bazlernejo estis seninfana. La gelernantoj estis hejme. Ili ne piedpilkis sur la futbalejo. Eble pro tio la cikonio venis pli proksimen nesuspektante danĝeron.

Neatendite du knaboj alvenis kun piedpilko. Vere ili ne havis permeson ludi en la korto de la bazlernejo. Malgraŭ tio, unue ili nur piedpilkis, sed post iom da tempo ĝi enuigis ilin. La knaboj serĉis alian amuzon.

Ili subite ekvidis en la proksimo la cikonion, kiu ne timante de ili serĉis nutraĵon.

La du knaboj interrigardis. En la sekva momento ili jam sciis, kiel ludi. Tiu venkos, kiu trafos la birdon per la piedpilko.

La cikonio vidis multfoje ludantajn geknabojn kaj flugantan pilkon. Ĝi ĉiam povis forflugi de antaŭ la pilko, se ĝi estis tro proksime.

Sed tiam la pilko ĉiufoje flugis al ĝia direkto hazarde. Nun la knaboj celis kaj piedbatis. La unua kaj la dua piedbato miscelis, la tria kiel kanonokuglo trafis ĝiajn piedojn kaj ĝi rompis ilin.

La knaboj ĝojegis:

–Hura! La cikonio estas trafita. Mi venkis. Nun kion fari per la birdo?

Diabla flamo ekbrilis en iliaj okuloj. Ili sciis, tiel la birdo ne povos forflugi. Ili povas fari kion ajn laŭ ilia plaĉo.

Ili terure torturis la apenaŭ vivantan cikonion. Ili batadis ĝian kapon per ŝtono kaj fine ili tordis ĝian kolon. La malfeliĉa birdo mortis dum grandaj suferoj.

Kiam ili vidis sian agon, ili forflugis.

En la sekva tago oni trovis la kadavron de la kompatinda cikonio.

La policistoj fulmrapide trovis la krimfarantojn, kiuj detale raportis, kion ili faris. En iliaj okuloj apenaŭ estis videbla la kompto de la morto de la cikonio.

Infanoj, espereble vi neniam faros tian teruraĵon. Ŝatu la birdojn, ĉar ili estas la amikoj de la homoj!

-La onklo Adalberto

Kelkaj bildoj pri cikonioj



Humoro



Du taksiaŝoforoj babilas:

–Ĉu en via aŭto estas alarmilo?

–Nur tiam, se mia bopatrino enaŭtiĝas.

*

–Kio estas diferenco inter tranĉilo kaj la lango de bopatrino?

–???

–La tranĉilo foruziĝas post iom da tempo.

*



Du amikoj renkontiĝas. Unu diras al la alia:

–Saluton, amiko! Bonvolu pruntedoni al mi 10 eŭrojn.

–Estas en ordo, sed kiam vi redonas la monon?

–Kiel mi sciu, Vi laboras, ne mi.

*



Humoro



Malfrunokte ebrulo iras hejmen. La edzino akceptas lin kaj ŝi demandas.

–Kie vi estis ĝis nun?

–Saĝa virino neniam demandas ĉi tion.

–Saĝa viro diras ĉion al sia edzino.

*

Knabeto kaŝobservas ĉe la pordo de la dormoĉambro de siaj gepatroj. Subite lia kapo ruĝiĝas kaj ekkoleras.

–Ili volas sendi min al psikologo, ĉar mi suĉas mian fingron.

*



–Ĉu vi aŭdis, oni eltrovis novan ilon, kiu 90 procente malpliigas la bruon en la aŭto? Krome ĝi ĝuste konformiĝas al la buŝo de la edzino.

*